

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 21/01/2021 Kvincentdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **798,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **291,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **238,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **217,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **52,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde majo 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 19 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).



N.ro 19 de "Por Komencantoj".

La kvara Voĉo estas la FAKTITIVA VOĈO. En ĝi oni vidas ke elekstera persono aŭ aĵo kreas la frazon, la okazon, la bildon. Ree ĉiuj esencaj vortoj restas la samaj. Ekster la frazo menciigas la nomo de la ekstera faranto kiu faras la Subjekton, la knabinon, fari la agon "lavi la ŝtonon". Aŭ la ekstera kreanto de la okazaĵo faras la ŝtonon lavati (de iu aŭ de io) aŭ laviĝi. Tiu ekstera instiganto de la okazaĵo instigas ĝian Subjekton fari la aktivan aŭ pasivan aŭ medialan agon, kaj tial unu el la tri fariĝas la Objekton de la instigo, kaj do estos en la akuzativo. Do "La patrino aŭ la naturo instigas, kaj ŝi aŭ ĝi faras tion per la Sufikso "-igi", jene: "La patrino lavIGAS la knabinon la ŝtonon" aŭ la Naturo lavatIGAS la ŝtonon(per akvo, vento, pluvo, suno, ktp)", Ree la esencaj vortoj kaj la esenca bildo restas la sama; nur la verbo ricevas la sufikson "-igi" kaj la Subjekto fariĝas Objekto, do kun la finaĵo "-n". La resto, la Objekto de "lavi" kaj la Adjektoj restas samaj: "La patrino lavigas la knabinon LA ŜTONON SUR LA MARBORDO" aŭ "La naturo lavatigas la ŝtonon SUR LA MARBORDO".



Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko



Kiel saluti dum pandemio

En Britujo la publiko ege maltrankviliĝas pri la problemo, kiel formale saluti kiam oni konsideras ke manpremi estas tro danĝere. La kriketa teamo de Anglujo elektis reciproke tuŝi la pugnoj, sed tio ne ŝajnas malpli danĝera ol manpremi, ĉar ĝi necesigas mana-al-manan kontakton.

Kubutotuŝi estas alia ebleco, sed tio estas malkonsilinda, ĉar oni konsilas nin, ke ni tusu kaj ternu en nian kurbiton. Iuj reciproke tuŝas la piedon, sed provinte tion, ni iomete maltrankviliĝas, ĉar tiel ni eble riskus perdi la ekvilibron kaj stumbli.

Ne necesas serĉi longe en la historio por trovi iujn vere senkontaktajn manierojn de formala intersaluto, ekzemple riverenco kaj klinsaluto, kiuj devus esti malpli riskaj.

Ni rekomendas la "longnazan" manpremon, populara en lernejoj ludejoj en kelkaj landoj, laŭ kiu oni etendas la brakon, kvazaŭ por manpremi, sed maletendas ĝin lastmomente kaj svingetas la fingrojn antaŭ la vizaĝo. Tradicie oni faras tion kun la dikfingro tuŝanta la nazon, sed tuŝi la nazon estas tute malpermesite, do ni rekomendas du-centimetran interspacon.



Donald Rogers

Adaptita el *New Scientist*, Feedback, "Take a bow", 21 Mar 2020, p 53.



Kiuj kontrolas sinesprimliberecon?

Kara Roger, en AE 513 vi demandas, kiuj kontrolas sinesprimliberecon. Samloke vi skribas: "Nun eĉ la Prezidento de Usono estas nepermesata uzi la reton por informi siajn legantojn pri siaj pensoj aŭ ideoj."

Antaŭ iom da tempo necesis iom pli longa diskuto en Danlando, por ke homoj komprenu, ke la libereco esprimi sian opinion ne estas senlima. Ĝi devas okazi ene de la kadro de la ekzistantaj leĝoj kaj respondecoj. Do, se ekzemple oni ofendas kaj kortumo konstatas, ke temas pri ofendo, tia ofendo ne estas parto de la libereco esprimiĝi. Oni ankaŭ ne rajtas alvoki al krimoj. Aŭ al teroro.

Laŭ la informoj, kiuj atingas min el la novaĵoj de Germanujo kaj Danlando, la nuna prezidento ne informis pri siaj pensoj (Ĉu li havas iajn krom la unu "Mi volas egi kaj decidi ĉion!"), sed mensogadis, liveris asertojn kaj riproĉojn sen pruvoj, alvokis al teroro.

La libereco sin esprimi ne estas la libereco kraĉi sur ĉiun, elvomi stultaĵojn. La libereco esprimi sin estas la libereco esprimi sian opinion. Por havi opinion oni devas koni argumentojn

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

kaj kontraŭargumentojn. Bedaŭrinde granda parto de la uzantoj de la (kontraŭ)sociaj mesaĝgrupoj miskomprenis tion.



Arnold Schwarzenegger tre bone klarigis, kien gvidas la granda gvidanto Trump.

Amike, **Peter Weide**



Kiel elfosi ilin??

Se nur troviĝus en Aŭstralio Esperantistoj junaj, ĉu viraj ĉu inaj - prefere ambaŭ, kia la bela junulino kies elokventa facilparolo, prononco kaj entuziasmo en sia raporto pri la abomenindaj okazaĵoj en Usono nuntempe, tiom imponis.



Vera Payne

(bela junulino <https://www.youtube.com/watch?v=2ZZmTXJrcQg&feature=youtu.be>)



La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj

La 16an de januaro venis 2 Chris Holliss kaj John Cassey



Estis bona renkonto kaj ni ekzerciĝis en Esperanto kaj ĝuis la tagon **Chris Holliss**



Reago al la indigno de Vera en AE 513

En la lingva respondo n° 28 al S-ro B.A. , kiun ni studis en la nivelo por progresantoj kadre de la ĵus finiĝinta somerkursaro, Zamenhof konkludas :” Ĉio dependas ja nur de la *kutimo*.” Mi ne scias kiu elpensis la esperantigon de la aŭstraliaj provincoj , sed ĉu logiko gvidis ties decidon ? Kelkaj nomoj estis tradukitaj , ekzemple Viktorio aŭ Sudaŭstralio . Eblas diskuti ĉu estas bona ideo elekti traduki la geografiajn nomojn. Ĉu ili ĉiuj havas tradukeblan signifon? Sed pensu pri Kvinslando . La proponinto provis rekrei en Esperanto la sonojn de la angla , kompreneble mise, ĉar la esperanta sonsistemo kaj la angla ne koincidas: “ kvins” ne sonas same kiel “ *Queens*”. Kvin eĉ havas alian signifon en Esperanto , kio povus erarigi la homojn, kiuj ne bone konas la geografion de Aŭstralio. Vera , kial tio aspektis al vi tute normale kaj akcepteble? Ĉu vi nun konsideras “ Njusaŭtvelo “ tiom monstra kiom antaŭ la legado de tiuj linioj? Certe la nomo “ *New South Wales*” estas granda defio ĉar ĝi entenas plurajn sonojn proprajn al la angla lingvo, sed finfine “ njusaŭtvelo” ne estas pli monstra ol “ kvinslando” .Ni diru kun Zamenhof . “ĉio dependas ja nur de la *kutimo*”.



Franciska Toubale



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

La gusto estas tiu de la gustanto.

LA GUSTO DE VERA ESTAS ANKAŬ MIA .



Geografiajn nomojn oni kutime kreas AŬ adaptante la sonojn de la etna nomo AŬ tradukante, se eble, la etnan vorton.

Ekzemploj de adaptitaj nomoj: Kvinslando, Njusaŭzvelso, Vestralio, Saŭzstralio, Viktorio.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Ekzemploj de tradukitaj nomoj: Reĝinlando, Novsudkimrujo, Okcidentaŭstralio, Sudaŭstralio.

La aŭstraliaj Esperantistoj ankoraŭ ne decidis, ĉu uzi la adapto- ĉu la tradukosistemon.

Same kiel Vera, mi trovas la sonon de la adaptaj nomoj (Kvinslando, Njusaŭzvelso, Saŭzstralio) tre malbelaj, parte ĉar ili estas longaj kaj anglosonaj. La anglosoneco donas al mi la senton, ke ni plu estas angla kolonio. Sed uzi la tradukitajn formojn naŭzas min ankaŭ, ĉar ili memorigas min ke Aŭstralio estis brita kolonio anstataŭ nederlanda, kvazaŭ ĝi plu estas. Granda dilemo por mi, kaj sendube ankaŭ por Vera, ĉu elekti unu aŭ la alian sistemon. Ĉu elekti Kvinslando kaj Njusaŭzvelso kaj Saŭzstralio aŭ ĉu Reĝinlando kaj Novsudkimrujo kaj Sudaŭstralio, k.t.p.

Eble Vera memoras, ke ŝiaj gepatroj havis similan literumadproblemon, kiam la jugoslava registaro penadis devigi la kroatojn uzi la saman literumadon por similaj samsignifaj vortoj serbaj. Mi vojaĝis tiuperiode tra ĉiuj partoj de la tiama Jugoslavujo. Tito kaj la serboj kaj aliaj esperis krei unu grandan kaj fortan Slavlandon (kun unu lingvo). Kun kelkaj el la ŝtelitaj partoj de Hungarujo. (ŝtelitaj per la helpo de Britujo kaj Usono).

Ĉar la nomoj de la aŭstraliaj provincoj ankoraŭ ne estas oficialaj, ĉiu Esperantisto rajtas proponi kaj uzi iun ajn tradukon Esperanten. Evidente Vera elektis la malbelan Reĝinlando/Novsudkimrujo-sistemon kaj mi elektis la malbelan Kvinslando/Njusaŭzvelso-sistemon. Ĝis fine la Akademio, se iam, oficialigos ilin (kiel dekojn da aliaj geografiaj nomoj).

Marcel Leereveld.

ĈU ADVERBA ? ĈU ADJEKTIVA ?

En la jenaj du similaj kazoj Zamenhof, neĝuste, ordonis uzi adverbon kie la etnaj lingvoj, ĝuste, uzas adjektivon:

AMI ne ĉiam estas longdaŭrA/E. (“ami” = Subjekto, kaj “longdaŭra/e = Predikativo).

Estas verA/E, KE ŜI GAJNIS. (“ke ŝi gajnis” = Subjekto, kaj “verA/E” = Predikativo).

Ĉar Zamenhof malĝustis, okazas kelkfoje du malsamaj signifoj por unu frazo kun la adverbo. Kiam oni montris tion al li, li diris ke en tiaj okazoj ni devas uzi Adjektivon, kontraŭe al sia regulo. Li evidente ne ŝatis ŝanĝi sian Fundament’an regulon.

Jen estas kvar ekzemploj en kiuj la uzo de la Adverbo kreas du tute malsamajn signifojn:

1). “Ili konsideris PUNI LIN kontraŭregulE” =

A). Ili konsideris puni lin (esti) kontraŭregulA, = puni lin, la punado ante lin, = kontraŭregula.

B). Se ili konsideris, pripensis, ke eble ili punu lin nenormalmaniere sed en maniero kiu estas

kontraŭ la reguloj. Do ili konsideris, puni lin kontraŭregulE.

2). “Mi opiniis malĝustE, ke la infano estu punata”. Se mi (ĝuste) opinias ke la punado estas malĝustA mi opiniis (esti) malĝusta ke la infano estu punotA. Se mia opinio estis malĝustA (mi

opiniis laŭ malĝusta kriterio): “Mi opiniis malĝustE ke la infano estu punota.

3). “La sciencisto trovis hazardE, ke la planto ne ekstermiĝis”. Se la sciencisto trovis la fakton de la

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

neekstermiĝo hazardA (= hazarda neekstermiĝo): “La sciencisto trovis (esti) hazardA ke la planto ne ekstermiĝis. Se la trovado (ate de la sciencisto) estis hazardA, se li hazarde trovis ion: “La sciencisto trovis hazardE, ke la planto ne ekstermiĝis”.

4). “La instruistino juĝis kruele, ke la infano restu enklase”. Se la instruistino juĝis la fakton de la enklasado kruele: “La instruistino juĝis krueleA ke la infano restu enklase”. Se la instruistino en kruelea maniero juĝis ke la infano devas resti enklase: “La instruistino juĝis krueleE, ke la infano restu enklase”.

En ĉiuj kvar kazoj oni do bezonas indiki la diferencon de la du eblaj signifoj per uzo de AŬ Adverbo AŬ per uzo de Adjektivo. Pro tio oni morale rajtas ĉiam uzi nur la Adjektivon en la kazoj kie la Infinitivo aŭ la frazo estas Predikativo, ne plu uzante la tiukoncernan konsilon de Zamenhof, kaj do ĉiam esti ĝusta.

Marcel Leereveld.



Brisbana Esperanto-Societo

"Estas pri nia unua kafoklaĉo de 2021 ĉe mia hejmo.

"Kiel kutime, nia unua kafoklaĉo por 2021 estis ampleksa kaj interesa kaj inkluzivis politikon, religion, lingvojn kaj, kompreneble, sanecon"

La anoj estas rekten John, Doug, Paul kaj Caroline.

Amike, **Doug Eising**



UK de UEA en Belfasto

La periodo por sendi proponojn por la Internacia Kongresa Universitato en Belfasto estis plilongigita. Resumon kaj biografieton bv. sendi al la IKU-sekretario (amri@huji.ac.il) ĝis la 31-an de januaro 2021. Honorario: 260 EUR, duono dependas de ĝustatempa livero de teksto por la IKU-libro kaj duono – de fizikaj partopreno en la UK kaj okazigo de la prelego. Ĉar la kongreso estas planata kiel hibrida, fizika partopreno ne estas nepra kondiĉo. Ekzemplon de resumo eblas vidi en <https://uea.org/teko/IKU>. informis AE **Katja Steele**



3ZZZ

Unu el la temoj de la elsendo de la 18a de januaro 2021 estas kosmologio : la renkontiĝo de Jupitero kaj Saturno aŭ la venusa atmosfero. Vi ekscios ankaŭ kial nuntempe estas alte taksitaj la aŭtismuloj.

Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



27 filmetoj de la kongreso-2021

Vi eble interesigûs pri 27 filmetoj, kiujn mi ĵus alŝutis al YouTube de la antaŭ-nelonga virtuala kongreso. La listo, kun ligiloj, estas ĉe <http://aea.esperanto.org.au/eo/kongreso-2021-youtube/>



Spektu la prelegojn kaj aliajn sesiojn de la [Aŭstralia kaj Nov-Zelanda virtuala kongreso kaj somerkursaro de Esperanto](#), en YouTube.

Bonvolu spekti, ŝati, kaj meti komentojn.

[Viziti la Kanalon de "Esperanto Australia" en YouTube](#)

Amike **Jonathan Cooper**



La franca Esperanto-kastelo Gresillon plu aktivas

Ĉiuj volontuloj de Greziljono bone fartas kaj preparas sin por reveni al vera vivo.

Niaj staĝoj okazos en april, julio kaj aŭgusto (vidi gresillon.org/agendo/), komencante per la kursaro PRINTEMPaS (gresillon.org/printempo/) kies aliĝo jam eblas (gresillon.org/aligho/).



Notu, eĉ vidi nur la okulojn sufiĉas por distingi ĉu ina aŭ vira **Roger Springer**



SKRIBU AL VIA NOVAĴLETERO kaj LA MONDO

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE